preskaŭ trionon de Afriko. Multloke tamen plantoj kaj iom da malsekeco fiksas kaj firmtenas la sablon. Kun plialtiĝa tutmonda varmiĝado, la vento pli forte blovos kaj malpliiĝos pluvo, vegetaĵo kaj malsekeco. La modeloj montras, ke la sablo sude de la Kalaharo en la suda kaj sud-okcidenta Afriko ĝis la jaro 2040 – plej malfrue ĝis 2060 – ĉie ekmoviĝos. Similajn sekvojn oni atendas por la resto de la mondo. Ankaŭ por Brandenburgio, provinco en la orienta Germanio, la modeloj prognozas signifan malpliiĝon de atmosferaj precipitaĵoj. Tie, meze en Eŭropo, la plurmetrojn altaj dunoj de la tereno por iama trejnado de soldatoj ĉe *Jüterbogk*, probable povos ekmigri. (*Nat.Geogr.*, okt 2005, p.12) *–sa*

## Baldaŭ ne plu "blankaj makuloj" en Alpoj

Geologistudentoj de la universitato *Erlangen / Nürnberg*, Germanio, montogrimpas sur krutaj deklivoj kaj forigas rub-ŝtonojn por identigi la specon de la firma ŝtonaĵ-tavolo sub tiuj. Ili laboras por sia diplomo kun granda korpaj engaĝiĝo kaj risko. Ilia tasko: la unua esploro de la regiono *Hopfgarten* en la aŭstria *Defereggen*-valo. "Kiu pensas", diras prof. *Bernhard Schulz*, "ke en Alpoj jam ĉiu ŝtono estas turnita, tiu eraras". La areo sude de la "Granda Veneciano" ankoraŭ estas "blanka makulo" (kiel oni nomas "nekonatan lokon") sur la geologia mapo de Alpoj. Dum la mallonga altmontara somero eblas kovri en sezono kaj per studento maksimume po dek kvadrat-kilometrojn. De la jaro 2005, post la unuaj 10 jaroj de laboro, mineralkolektantoj kaj konstru-estroj povas aĉeti la maparon en gradigita skalo 1: 50 000. Tiu mapo certe validas ankaŭ por informo pri tiuj valoj, kiujn endanĝerigos terglitoj. (*Nat.Geogr.*, jun 2003, p.14)

## Por kolektantoj malpermesate

La montoj de la Nacia Parko "Aŭstria Kalk-Alpoj" estas porozaj kiel bulo de fromaĝo. Tamen la naciparka direktoro *Erich Mayerhofer* miras denove kaj denove pri la altagrada dimensio de kaverno – nekonata al la publiko – en la *Sengren*-montaro. Ĝis nun estas mezuritaj 23 km de la voj-sistemo, inter ili preĝej-alta rokaĵa katedralo, bizaraj stalaktitaj kavernoj kaj smeraldverda lago. La regiona registaro de Supra Aŭstrio tuj deklaris tiun trezoron en la koro de la Nacia Parko – intertempe baptita "*Clara*-Kaverno" – tute neburokrate kiel protektendan naturmonumenton kaj ŝlosis la enirejon fer-barile. La aliro kaj eniro estas konataj nur de malmultaj inicitoj. Krom la trovintoj de la "Kaverno-Societo *Sierning*" nun nur al sciencistoj estas permesate eniri. Tiuj volas esplori, kiel estiĝis la kaverno kaj al kiuj plantoj kaj bestoj ĝi servis kiel vivomedio. Por turistoj la kaverno estas fermita. La eniro estas tro danĝera kaj la risko tro granda, ke stalaktit-ĉasistoj kaj senrespektaj mineral-kolektantoj detruus la naturjuvelon, ĝis nun preskaŭ netuŝitan de homaj manoj. (*Nat.Geogr.*, dec. 2005, p.12) *– sa*


# Scienca Revuo Vol. 58 (2007)(1) / n-ro 208

***Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)***
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

**Pres-indikaĵoj:** ISSN 0048-9557
**Eldonanto:** ISAE
**Laserkopiita:** Januaro 2007
ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30, DE - 37269 Eschwege*/Germanio
**Responsa redakta teamo:** La estraro de ISAE

**Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare**
pagebla pere de via
**a) landa peranto (resp. landa delegito)**
aŭ rekte al
**b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z** *) ***vd. sube***
t. e. vi pagu (anstataŭ al ISAE/Sachs) al la **germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio,** kun indiko **"ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"**
IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF


## Landaj Perantoj de ISAE

| | | |
|---|---|---|
| **Aŭstralio** | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| **Brazilo** | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| **Britio** | *S-ro David Kelso*<br>*5, Craigenhill Rd., Kilncadzow*<br>*GB – Carluke, ML8 4QT* | *<davidekelso@yahoo.co.uk>* |
| **Finnlando** | *S-ino Päivi Saarinen*<br>*Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| **Francio** | *S-ro Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@compagnet.fr>* |
| **Irlando** | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| **Korea Resp.** | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| **Norvegio** | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| **Pollando** | *S-ino Maria Majerczak*<br>*ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków* | *<mamajer@interia.pl>* |
| **Svedio** | *S-ino Lisbeth Andréasson*<br>*Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| **Usono** | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)**
**(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***